

Bertil Andreasson

:



Bertil Andreasson naskiĝis en la jaro 1934, eklernis Esperanton en 1956 kaj partoprenis sian unuan Universalan Kongreson en 1958 en Mainz, Germanio. La unuaj ILEI-konferencoj en kiuj li partoprenis estis en Locarno, Svisio 1979 kaj en Gödöllő, Hungario 1981. 1982 estis asemblea konferenco en Seiano, Italio, kaj tie oni elektis lin kasisto aŭ estrarano pri financoj. Lia kasista laboro daŭris ĝis 1999 en Karlovy Vary, Ĉeĥio, entute 17 jarojn. Bertil partoprenis entute en 20 ILEI-konferencoj:

1979	Locarno, Svislando	1987	Lodzo, Pollando	1995	Övik, Finnlando
1981	Gödöllő, Hungario	1988	Kerkrade, Nederlando	1996	Tabor, Ĉeĥio
1982	Seiano, Italio	1989	Carleon, Britio	1997	Lara, Australio
1983	Siuntra, Portugalio	1990	Hannabanilla, Kubo	1998	Montpellier, Francio
1984	Skofja Loka, Jug.	1991	Voss, Norvegio	1999	Karlovy Vary, Ĉeĥio
1985	Kungälv, Svedio	1992	Bratislavo, Slovakio	2003	Örestrand, Svedio
1986	Louvain-la-Neuve, Belgio	1993	Valencio, Hispanio		



La foto montras Bertil kun la Estraro de ILEI, fotita en la Konferenco de 1999. De maldekstre: Carla de Lorenzi, Atilio Orellana Rojas (sekretario), Stefan MacGill (vic-prezidento), Bertil Andreasson (ĝistiamas kasisto), Boo Mee Kim Lindblom (la ĵus elektita kasisto), Jennifer Bishop (help-sekretario) kaj Maŭro La Torre (prezidanto).

Bertil plene aranĝis la konferencon en Kungälv en 1985, kaj en tri pliaj skandinaviaj konferencoj li prizorgis ĉiujn praktikajn aranĝojn (loĝigon, manĝojn, ekskursojn, ks): Voss 1991, Övik 1995 kaj Örestrand 2003. Kompreneble li respondecis pri la financaj aferoj en ĉiuj aliaj listigitaj konferencoj de post 1982. Bertil Andreasson estis la sekciestro en Svedio dum pli ol dudek jaroj.